

murdo

en
esperantujo



Daniel Moirand

Murdo en Esperantujo

Murdo en Esperantujo

Daniel Moirand

Listo de la rolantoj

La policanoj

Hammerkopf, William - Polica leŭtenanto en la urbo Gremshaim
Helms - Subleŭtenanto en Grubstadt
Jolanda - Telefonistino en la policejo
Werner, Horacio - Subleŭtenanto en la sama policejo
Williams - Polica medicina doktoro

La esperantistoj

1. El la Rumsheima klubo:

Evans, Izabela - Bibliotekistino
Hopeful, Kristina - Kontoristino
Jensen, Malkolmo - Kolegia instruisto
Kluams, Elizabeta - Poŝtistino, vidvino
Smaks, Julio - Emerita medicina doktoro
Vapaus, Geraldo - Bienposedanto en la vilaĝo Rumsheim

2. El la Grubstadta klubo:

Dillon, Marina-Membro de la Esperanto-klubo, amikino de Izabela Evans
Stern - Klubestrino
Stenman, Marko - La murdito

kaj:

Kristina - Servistino en restoracio, amikino de Hammerkopf.

La lokoj

Rumsheim - Vilaĝo, kie okazis krimo. Je 15 kilometroj de Gremshheim.
Gremshheim - Urbo apud Rumsheim. En ĝi troviĝas la loka policejo.
Grubstadt - Urbo situanta norde de la du antaŭaj lokoj.

Dediĉo

Al mia edzinjo tiun ĉi libron mi dediĉas.

DM

Murdo en Esperantujo

Eldono de Flandra Esperanto- Ligo

n-ro 5 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi e-libro rajtas esti kopiita nur al la komputilo kaj/aŭ librolegilo de la aĉetinto. Transdoni la libron al aliaj estas kontraŭleĝe kaj malhoneste al la aŭtoro kaj/aŭ tradukinto kaj/aŭ ilustrinto kaj/aŭ eldoninto, kiuj tiel ne estas rekompencataj pro sia krea laboro.

UNUA ĈAPITRO

Kiam li eniris la salonon, la spiro de ĉiuj ĉetabliĝintoj haltis. La parolado ĉesis kaj la okuloj, kiuj ĝis nun estis direktitaj al la parolanta virino, mirleviĝis. La ĵus enirinta viro aspektis bela, tridek-tridekkvinjaraĝa kaj altstatura. Liaj nigraj haroj harmonie reliefigis la helecon de lia haŭto. Oni povis imagi lin sur apudmara strando kun sunbruligitaj vizaĝo kaj korpo, aŭ kubutapogita ĉe servotablo de moda trinkejo. Ĉiuokaze, liaj trajtoj estis ege palaj kaj montris nenion krom spuroj de intensa timo kaj akra doloro. Lia buŝo tordiĝis kaj la lipoj streĉitaj pro iu strebo vane provis eligi sonon. Tute certe io okazis al li antaŭ nelonge, kio ĝisfunde skuis lian korpon kaj animon.

Li enstumblis la ĉambron, sukcesis fari kelkajn ŝanceliĝantajn paŝojn kun etenditaj brakoj, provante sin direkti al la personoj, kiujn li vidis sidantaj ĉe la tablo. Post ĉirkaŭa vaka rigardo kaj lasta hezita paŝo, li alkroĉiĝis al la tablo kaj bloke planken kolapsis sur la ventro, kvazaŭ sekunde segita kverko. Pro lia peza falo tremis la seĝoj kaj mebloj.

Dum minuto okazis nenio pro la stuporo, kiu atingis ĉiujn. Post tiu momenta senmoveco, doktoro Smaks, kies seĝo plej proksimis la kolapsinton, leviĝis, aliris lin kaj retrovante la gestojn de la profesio, kiun li forlasis antaŭ kelkaj jaroj, komencis palpesplori lin. La aliaj ĉeestantoj rapide surpiediĝis, forpuŝis la seĝojn kaj ĉirkaŭis la paron formatan de la nekonato kaj de la doktoro. Neniu kapablis paroli pro la granda miro kaŭzita de tia stranga apero.

La doktoro post rapida esploro levis siajn okulvitrojn sur la frunton laŭ kutima gesto, kaj post nea kaj rondira rigardo li eldiris la omenajn vortojn:

- Li estas mortinta!

La diraĵo eksplodis kiel bombo inter la membroj de tiu kutime kvieta kaj senproblema rondeto. Ĉiuj mire rigardis unu la alian. Aŭdiĝis vespiroj kaj du apudstarantinoj nerveze taŭzis sian naztukon. Ĉiuj nun perceptis la vundon sur la dorso de la falinto. Ili ne rimarkis ĝin antaŭe, ĉar ege

malmulte da sango ĉirkaŭis ĝin. Makulo granda kiel monero signis la lokon, kie okazis la atako, sub la maldekstra skapolo.

Geraldo Vapaus, la bienposedanto, kiu akceptis ĉe si la aliulojn okaze de la regula ĉiumonata Esperanta kunveno, finfine murmuris:

- Ĉu vi certas pri tio, kion vi asertas, doktoro?

- Sen ero da dubo. La mortinto ricevis vundon per io tranĉa. Li apenaŭ kapablis aliri la pordon, malfermi ĝin kaj eniri por fali apud ni. Li verŝajne kadavris antaŭ ol lia korpo atingis la plankon!

Tiuj lastaj vortoj mirigis ĉiujn: morti, jes, sed tiel krude, tiel ... nedece! La okuloj interrigardiĝis kun mirkonsterno kaj ioma ĝeno. Kio do okazis? Kiu estas la mortinto? Kiel kaj kial li venis ĉi tien, por ke oni finfine mortigu lin? Ĉar ne povis esti dubo: oni mortigis lin.

Denove ekparolis Geraldo Vapaus:

- Ĉu unu el vi konas la mortinton? Ĉu iu jam antaŭe vidis lin? Post ĝenerala nea respondo, li aldonis:

- Nu bone, pli babili ne necesas. Mi tuj telefone alvokos la policon. Nenio alia estas farenda.

Li disigis la cirkle amasitan grupon kaj atingis malgrandan rondan tablon, kiu staris apud la muro. Sur ĝi rege sin montris malnova retrostila telefonaparato. Li levis la aŭskultilon per la liva mano, ciferumis la bezonatan numeron sur la disko kaj dekstramane premis la apartigitan parolilon al sia buŝo. Li baldaŭ aŭdis:

- Centra policejo de Gremsheim, kion vi deziras?

- Mi estas Geraldo Vapaus kaj mi telefonas el la vilaĝo Rumsheim. Io eksterordinara ĵus okazis ĉe mi: nekonato eniris mian domon, tuj falis surplanken kaj, laŭ la diro de iu ĉeestanto, medicina doktoro, li estas mortinta. Kion mi devas fari?

- Bonvolu denove diri vian nomon kaj precizigi vian loĝlokon dum mi notas la informojn.

- Mia nomo estas Geraldo Vapaus - li diris pli lante -, emerito kaj kulturisto en Gremshheim, 15 kilometrojn for de la urbo. Mia preciza adreso jenas: 18, Pado de la Alaŭdoj.

- Bone. Ni tuj alvenos. Tuŝu nenion kaj ĉiuj restu endome, por ke ni povu enketi senĝene, kiam ni estos tie.

- La domo troviĝas iom retiriĝe de la pado, malantaŭ krataga kaj Ionicera heĝo, kiu kaŝas ĝin, sed ĉar mi scias, ke vi alvenos, mi lumigos la ĝisdoman aleon, por ke vi facile trafu ĝin.

- Dankon, ni estos baldaŭ ĉe vi. Mi ripetas: tuŝu nenion.

Vapaus forkenmetis la aŭskultilon kaj parolilon kaj, turninte sin al la ceteraj li precizigis:

- Geamikoj, bonvolu rezidiĝi kaj okupi viajn antaŭajn lokojn. La polico baldaŭ estos ĉi tie. Oni petis min transdoni la peton tuŝi nenion, kio povus malhelpi la policistojn.

Kun malklaraj kaj duone laŭtaj babiladoj, la gastoj revenis al siaj sidlokoj, kiujn ili tiel rapide kaj neatendite forlasis. Ili nun denove kviete sidis. Ili interŝanĝis iom maltrankvilajn kaj demandajn rigardojn, kvazaŭ ili dirus: „Kio okazas al ni?” Post mallonga ĝenerala frustrado, ekregis ĝena silento.

La telefoninto, Geraldo Vapaus, estis persono ĉirkaŭ sesdekjara. Lia hararo forte arĝentiĝinta ĉe la tempioj donis al la trajtoj de lia vizaĝo ion nedifineble noblan: miksaĵo de saĝeco, ŝuldata al la vivosperto, kaj de energio, kiun la jaroj ne sukcesis forviŝi. Plie, io milda tralikis inter la sulkoj de la frunto. Spite tiun ĉi mildecon, la fajro de la okuloj montris persiste viglan inteligentecon. Ĉio tio indikis nekutiman personecon, samtempe energian kaj bonan.

Klariginte sian voĉon per mallaŭta tusetto, unu el la gastoj duonvoĉe demandis:

- Kion vi opinias pri la ĵusa okazintaĵo? Ĉu vi ne taksas terure, ke subite kaj neatendite aperis nekonata viro? Lin oni murdis malantaŭ tiu ĉi pordo kaj ni nenion aŭdis! Ĉu li troviĝis ekstere, ĉar li intencis viziti vin, sinjoron

Vapaus, kaj oni sukcesis mutigi lin antaŭ ol li kapablis intervidiĝi kun vi? Eble li nur hazarde preterpasis vian domon, kiam oni faligis lin!

SinJORINO Kluams, kiu ĵus parolis, sukcesis diri tion, kion verŝajne ĉiuj ĉeestantoj havis en la menso, sed ne aŭdacis laŭte formuli.

- Neniun respondon mi kapablas rebati, diris Geraldo. Mi jam asertis, ke mi ne konas la viktimon. Kiel vi, mi vidis lin la unuan fojon, kiam li transpaŝis la sojlon de mia domo. Plie, miaj antaŭaj kaj nunaj okupoj ne ebligas al mi supozi, ke iu dezirus kaŝe intervidiĝi kun mi, kaj ke oni murdus lin por malhelpi tiun renkonton. Ĉu iu el vi havas ion por aldoni ĉi-teme, antaŭ ol la polico alvenos? Tiam estos malpli facile libere paroli inter ni. Tamen ŝajnas al mi, ke tia stranga apero ne estas hazarda. Nia vilaĝo kuŝas ekster la grandaj trafikaj vojoj kaj la Pado de la Alaŭdoj troviĝas flanke de la domaro. Oni ne povas materiiĝi ĉi tie pro nura sencela kaŭzo. Nur per propra volo kaj deziro oni kapablas atingi mian domon. Ĉu iu havas ion por diri? li ripetis.

Eta voĉo aŭdiĝis kaj Izabela Evans levis la manon, kvazaŭ ŝi troviĝus en klasĉambro kaj petus parolvicon. Per iom tremanta voĉo, kiun substrekis nervozaj manoj taŭzantaj kaj ĉifantaj batistan naztuketon, ŝi diris:

- Kvankam mi havis tre malmulte da tempo por spekti la enirinton, ŝajnas al mi, ke mi vidis lin antaŭe. La renkontiĝo tute hazarde okazis en la urba supermarkto, kie mi troviĝis ĉe la komenco de la semajno por butikumi. Mi staris en vico ĉe la ruliĝanta tapiŝo apud kasejo, kiam nudelpaketo, se mi bone memoras, falis el mia ĉareto. La persono staranta malantaŭe sin klinis por pluki ĝin kaj redoni al mi. Estis viro, kiu aspektis tre afabla kaj li tuj almilitis mian simpation. Mi varme dankis lin. Povas esti, ke tiu ĉi homo kaj nia ĉi-vespera entrudanto estas la sama persono. Sed mi nenion firman povas aserti.

Paginte mian konton, mi iris al mia veturilo por ŝarĝi la varojn en la kofrujon. Mi denove vidis mian poststarinton ĉe la enireja vitra kluzo de la magazeno. Dum mi finlokis mian aĉetitaĵon, li malaperis, ĉar, kiam mi relevis la kapon liadirekten, li jam estis for.

Diris tion Izabela Evans, de ĉiuj bone konata fraŭlino, ĉar ŝi okupas reliefan postenon en la vilaĝo: ŝi zorgis pri la sorto de la loka biblioteko.

Tiun postenon ŝi ricevis du jarojn antaŭe. Oni sciis en la vilaĝo, ke ŝi venas de pli granda norda urbo. Ŝi estis ĝenerale agnoskata kiel ekzempla persono, kiu bone konas sian laboron kaj kapablas laŭdinde efektiviĝi ĝin.

Kun sia tria jardeko, ŝi simpatie kaj bele aspektis. En la grupo, ŝi estis la plej juna fraŭlino. La staturon ŝi havis mezan. Ŝia longa onda hararo facile allogis viran intereson. Ĝi estis tiom nigra, ke ĝi fojfoje havis blujajn rebrilojn. Laŭaspekte, ŝi prezentis (kiel diras la popola esprimo) sufiĉe da kio bezonata kie bezonata, kaj tio favore impresis viran okulon. Ŝi estis delikate ŝminkita kaj elegante harmoniigitaj juveloj diskrete reliefigis ŝian maturan belecon. Tre ina parfumo aldonis finan tuŝon al ŝia virineco. Ŝiajn nigrajn okulojn oni rimarkis pro ilia penetrema rigardo. Kiam ili fiksis iun, oni sentis, ke ili iras ĝis la fundo de la persono. Tamen en tiu rigardo skrupula spektanto kapablus rimarki etan vualon da tristeco. Ĝi malofte malaperis sed ŝi kapablis ridi kaj samtempe konservi ĝin ...

Ŝiaj samtabloj aŭskultis ŝin kun intereso. Neniu rimarkigo konkludis ŝian rakonton. Ili havis nenion por aldoni kaj atendis la oficialan aspekton de la baldaŭa enketo.

Nelonge poste aŭdiĝis aŭta bruo ekstere kaj ekzumis la sonorilo de la domo:

- Devas esti la policanoj! diris la dommastro. Ili rapidis!

Li leviĝis kaj atingis la pordon, kiun li malfermis. Sur la sojlo konturiĝis du viroj vestitaj per uniformoj. Vapaus enirigis ilin kaj la unua enpaŝanto tuj prezentis sin:

- Leŭtenanto William Hammerkopf el la Gremshheim-a polica brigado, kaj jen mia helpanto, subleŭtenanto Horacio Werner, li diris, gestante al la dua blue vestita viro. Ĉu vi estas la persono, kiu telefonis al ni?

DUA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

TRIA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

KVARA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

KVINA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

SESA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

SEPA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

OKA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

NAŬA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEKA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-UNUA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-DUA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-TRIA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-KVARA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-KVINA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-SESA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-SEPA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-OKA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DEK-NAŬA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DUDEKA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DUDEK-UNUA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DUDEK-DUA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DUDEK-TRIA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

DUDEK-KVARA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro, kaj ne en tiu ĉi provversio. La plena versio estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

Kolofono

Titolo: Murdo en Esperantujo

Aŭtoro: Daniel Moirand

Serio „Stafeto” n-ro 5

Kovrilo: Hugo Fontyn

ISBN: 90 71205 20 7

UDK: 82-3=089.2

SISO: 829

Leĝa depono de la papera versio: D/1988/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2010 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de „Murdo en Esperantujo” apartenas al \$NOMO.